

Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede ...

la 23-an de januaro

ĉe M.-A. kaj Knud Sunier
Av. des Alpes 150, Montreux
021 961 38 56 / 079 210 97 75
📞📞📞📞📞

la 6-an de februaro

ĉe Gilbert Darbellay
ch. de l'Orme 6, Morrens
021 732 23 22 / 079 315 14 13
📞📞📞📞📞

la 20-an de februaro

ĉe Monique Golaz
Ecole-de-Commerce 3, Lausanne
021 646 42 78 / 079 754 21 60 75
📞📞📞📞📞

Ne forgesu aliĝi ĉe:

http://doodle.com/bk4pd6i_vx6efq4m5#

Ŝerco

Fine de sia konsulto, sinjoro demandas al sia kuracisto :

- *Mi timas, ke mia edzino perdas sian aŭdpovon, sed ŝi ne akceptas tion. Kion fari ?*

Por kontroli ĝin, la kuracisto proponas al li stari je 10 metroj fore de ŝi kaj voki ŝin kaj se ŝi ne respondas, alproksimiĝi je 5 metroj kaj finfine ... apud ŝi.

La sinjoro eniras hejmen kaj ĉe la pordo diras al sia edzino :

- *Kion ni manĝos ĉi-tagmeze ?*

Li aŭdas neniun respondon. Li do alproksimiĝas je 5 metroj kaj redemandas...

Neniu respondo aŭdeblas. Finfine, li proksimiĝas al ŝi kaj redemandas. Ŝi krias al li : *"Terpomojn kaj pork-rostaĵon. Triafoje mi diras tion al vi !"*

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch

www.facebook.com/societedesperanto.lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

februaro 2015 - n° 2

Kiel membro de LES, vi estas kunvokita al la Ĝenerala Asembleo

lunde, la 2-an de februaro je la 20-a
ĉe la unua etaĝo de la laŭzana stacidoma bufedo

Lunde la 2-an de marto

Decidota

Lunde la 6-an de aprilo

Decidota

Lunde la 4-an de majo

Ni apartigos la diversajn aĵojn el nia ŝranko, en la bufedo, sciante ke ni devos forigi ĝin antaŭ la fino de la jaro.

Sabate la 20-an de junio

Jara ekskurso



Laŭzana Esperanto - Societo

Protokolo 2014

La ĝenerala asembleo de LES okazis la 3-an de februaro ĉe la unua etaĝo salono de la bufedo CFF en Laŭzano.

Ĉeestis 12 aktivaj membroj: David Buhmann (prezidanto) -- Françoise Pétermann (kasisto) - Knud Sunier (redaktoro de la informilo) - François Randin (sekretario) - Rosario Scopelliti - Giulio Grigoletto - Monique Golaz - Marie-Antoinette Sunier - Nancy Fontannaz - Pierre Delaunay - Gilbert Darbellay - Lucienne Dovat.

Ĉeestis 2 kandidatoj: Sylvain kaj Sarah Meigniez.

Senkulpigis 7 aktivaj membroj: Charlotte Blanc Maillard (vicprezidanto) - Marie-Danièle Gay - Christiane Andreae - Renée Chollet - Cléa Robin - Claude Blanc - Nino Siroli.

La prezidanto malfermas la asembleon je la 20-a kaj 10.

- La **tagordo** kaj la **protokolo 2013** estas akceptitaj unuanime.
- David Buhmann - kiel **prezidanto** - raportas pri diversaj eventoj de la jaro.
- Françoise Pétermann - kiel **kasisto** - raportas pri la diversaj movoj de nia kaso. La kapitalo fine de 2013 estis je sFr 3503.47. Multaj membroj ne pagis sian kotizon, tiel la jara perdo de la bilanco estas je sFr 312.05.
- La raporto de la **kaskontrolantoj** subskribita de Monique Golaz kaj Cléa Robin estas legita.
- La raportoj de la prezidanto, de la kasisto kaj de la kaskontrolantoj estas kune akceptitaj unuanime.
- Mortintoj kaj demisiantoj: Bonŝance - diris la prezidanto - neniu mortis aŭ demisiis ĉijare.
- Sylvain kaj Sarah Meigniez estas akceptitaj kiel novaj membroj.
- La **kotizo** restos po sFr 50.- por la aktivaj, po sFr 30.- por la pasivaj membroj kaj po sFr 10.- por la junuloj. Venontjare, la komitato proponos ŝanĝon en la statuto por krei novan kotizon por aktivaj geedzoj.
- Knud Sunier de unu jaro redaktas la **informilon**. Nancy Fontannaz daŭre konsentas korekti ĝin. Ni dankas ilin pro tiu grava laboro. François Randin, ĉiumonate, sendas nian gazeton perpoŝte al la personoj, kiuj mendis ĝin. La membraro rezignas pagigi al ili la elspezojn de la sendado. La aliaj membroj ricevas la informilon perrete.

*Memore: Ĉiuj membroj ricevas **perpoŝte** la februaran informilon (kunvokon al la ĜK - protokolon lastasembleon - aliĝilon venontjaren pri la informilo - kotizpagilon).*

- La komitato - ekde la lasta jaro - konsistas el 5 membroj, kiuj estas unuanime reelektitaj:

Prezidanto : David Buhmann

Vice-prezidanto : Charlotte Blanc Maillard

Kasisto: Françoise Pétermann

Sekretario: François Randin

Redaktoro de la informilo: Knud Sunier

- La **kaskontrolantoj**: Cléa Robin prezidos en 2014. Pierre Delaunay estas elektita kiel nova membro.

Dataro 2014 - 2015:

Monataj kunsidoj: la 3-an de marto - la 7-an de aprilo - la 5-an de majo *** - la 1-an de septembro - la 6-an de oktobro - la 3-an de novembro - la 5-an de januaro 2015.

La ekskurso kutima okazos sabate la 28-an de junio 2014 organizota de Charlotte Blanc Maillard.

La Zamenhofa Festo okazos sabate la 13-an de decembro 2014 en la loko de USL en Ouchy kaj la **ĝenerala asembleo** okazos la 2-an de februaro 2015.

La babiladaj rondoj: Vendrede, la 14-an kaj la 28-an de februaro, la 14-an kaj la 28-an de marto, la 11-an kaj la 25-an de aprilo, la 9-an kaj la 23-an de majo, la 6-an kaj la 20-an de junio, la 4-an de julio ***, la 12-an kaj la 26-an de septembro, la 10-an kaj 24-an de oktobro, la 7-an kaj 21-an de novembro, la 5-an kaj la 19-an de decembro ***, la 9-an kaj la 23-an de januaro 2015.

La budo en la bazaro ne plu okazos en 2014. La membroj decidis rezigni dum unu jaro kaj trovi aliajn rimedojn propagandajn.

- **Proponoj kaj diversaĵoj**:

1. Christiane Andreae - perletere - re-proponis ĝemeliĝon inter Laŭzano kaj Kubo. La prezidanto klarigis, ke ŝi jam proponis tion en 2011. La komitato tiumomente respondis dirante, ke nia societo ne havas sufiĉajn fortojn kaj tempon por ĝemeliĝo, sed ke ŝi mem povas organizi ĝin.
2. Dum la venonta jaro - ĉiumonate - la kaso pagos la luon (sFr 50.-) de la salono. Propono fare de Françoise Pétermann kaj akceptita.
3. Nancy Fontannaz re-memorigas la verkon komunan : *La Mistera Kastelo*.

La prezidanto fermas la asembleon je la 21-a kaj 30

La sekretario : François Randin